

Johann Wolfgang von Goethe,
Al la forulino

tradukita de Lorenz Urbano

Ĉu perdis mi vin, belulino?
Ĉu via fuĝo — mia sort' ?
Ankoraŭ sonas laŭ rutino
En la oreloj ĉiu vort'.

Kaj kiel al ĉiel' matene
Rigardas vane la migrant',
Se alte tra l' aer' serene
Eksonas la alaŭda kant':

Mi same ĉien en la landoj
Rigardas ofte kun pasi';
Vin vokas ĉiuj miaj kantoj:
Revenu, amatin', al mi!

*Traduko de la Germana poemo "An die Entfernte" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de LORENZ URBANO (civila nomo: Heinrich Lorenz, *1902 – †1980).*

MR-518-1a / Arg-845-1703 (2013-02-27 10:35:38)

Pri la tradukinto vidu la retejon . Lia civila nomo estis "Heinrich Lorenz", li vivis de 1902 ĝis 1980.